

Orgaan  
van de Bond van  
Arbeiders-  
Esperantisten FLE

# Laborista Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nепveustraat 33 II, Amsterdam-17, telefoon (020) 82177  
Penningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-19, postgiro 331133 - Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

## Kion ni volas en 1967?

Denove forglitis jaro en la pasintecon. En tiu jaro ni povis mencii la brilajn kongresojn de IFEF, UEA kaj SAT. En Utrecht kaj Leeuwarden oni inaŭguris monumentojn honore al D-ro Zamenhof. La rilatoj kun la aliaj Esperanto-organizoj en nia lando ankoraŭ pliboniĝis. Niaj semajnfinaj studkonferencoj estis bone vizitataj, precipe la lasta, kie parolis i.a. k-do Bartelmes.

Agrable estis, ke VARA propra-iniciate proponis al ni okazon propagandcele paroli antaŭ la mikrofono. Same agrable estis, ke VARA en iu elsendo lasis paroli s-ron Wensing favore al Esperanto.

Signo, ke oni agnoskas nin estis la invito de la Partio de la Laboro viziti ĝiajn kongresojn.

El ĉi tiu — nekompleta — resumeto montriĝas, ke la pesimistoj en niaj vicoj malpravas. Sed estas alia fakto. Nia Asocia estraro aĉetis de FEN 2500 ekzemplerojn de „Bazaj faktoj pri la internacia lingvo Esperanto”. Bedaŭrinde niaj sekcioj tro malmulte uzis la eblon propagandi per ĉi tiu broŝuro. Ĉu pro tio, ke la Asocia estraro disponigis ilin senpage? Tiuj, kiuj pro kio ajn ne ŝatas propagandi, estonte ne plendu, ke nenio okazas.

Ĉar en la komenco de nova jaro oni kutime dorlotas bonajn intencojn ni esperas, ke al tiuj intencoj ankaŭ apartenas la intenco mendi kiom eble plej baldaŭ la bezonatajn broŝurojn. Ne por meti ilin en ŝrankon, sed por bone uzi.

Cetere parolante pri la propagando ni devas atentigi ĉiujn esperantistojn — ne nur en nia lando — pri tre malagrablaj faktoj.

Unue ni konstatas, ke nia membraro pli kaj pli griziĝas. Kaj due, ke alfluo de junaj adeptoj ne aŭ preskaŭ ne okazas. Feliĉe nur tre malmultaj ekziĝas. Tamen nia membronombro malkreskas pro tio, ke neniu vivas eterne. La sekvo de tio

estas, ke niaj enspezoj ĉiujare malleviĝas, sed la elspezoj restas proksimume samaj. Relative do niaj elspezoj altiĝas kompare al la malaltiĝantaj enspezoj. Tio signifas, ke nia Asocio ankoraŭ dum certa nombro da jaroj povos vivi, poste vegeti kaj tiam? Ni estas konvinkitaj, ke multaj el nia membraro forte protestas kontraŭ tio. Tamen, se ni ne ŝanĝas nian propagandan manieron, la de ni skizita situacio estas nerefutebla. Kredu, ke ni ne ĝojplene vidigis vin en la spegulo. Sed kiam la spegulo montras al ni la makulojn kaj faldojn en nia vizaĝo ni almenaŭ scias, ke fariĝis tempo fari ion por forigi la malbelaĵojn. Konkrete dirite: *Ni kune — vi en la sekcioj kaj, distriktoj, la asocia estraro en si mem kaj en la konsilantara kunveno — prikonsideru unuoloke kion ni fakte volas.*

Ĉu ni faru propagandon ĝeneralsence aŭ ĉu ni direktu nian propagandon al certa parto de la publiko? Ĉu ni propagandu de el la sekcioj aŭ ĉu ni faru tion de el la centro de la Asocio, kompreneble en kunlaboro kun la sekcioj kaj la distriktoj? *Ĉiuokaze — ni devas nun propagandi!* Iam ni skribis, ke estas afero de esti aŭ neesti. Ni ripetatas tion kaj aldonas, ke tiu aforismo de Hamleto nun por nia Asocio havas pli urĝan signifon. *Se ni deziras esti kaj resti ni devas ekzili nian letargion kaj eklabori.*

Ni estas certaj, ke bone organizita propagando en la ĝusta direkto devas rezulti en kursoj por komencantoj kaj poste en gajno de novaj membroj. Kaj jen afero kiu meritas nian specialan atenton. Por la kursoj ni bezonas kursgvidantojn kaj, kiam la abonantaro por la skribaj kursoj kreskas, korektojn. Ĉu ni disponas pri ili? Kaj kiam la nova membroj sin anoncas ili kredeble estas junaj homoj. Ĉu ni havas eblojn akompani ilin al plena esperantistiĝo? Ĉu nia kadro estas preta akcepti ilin? Denove mi memorigas al iu artikolo en kiu ni skribis, ke ni ĉiam devas esti pretaj. Ni timas, ke nia kadro estas tro malgranda akcepti iom gravan membrakreskon. *Tial ni konsilas al ĉiuj ne nur prikonsideri la demandon: kion ni volas, sed ankaŭ kiel ni propagandu kaj samtempe ĉu nia kadro sufiĉas. Al tiu lasta punkto apartenas la demando, kiel ni eduku sufiĉe vastan kadron.*

Estas klare, ke, se ni volas fari bonan propagandon, tio kostos al ni sufiĉe da

mono kaj tempo. Ni trovu rimedojn havigi al ni la monon kaj la tempon. Sed tio ne sufiĉas. Por fari ĉiun laboron ni bezonas ankaŭ personojn, kiuj povos kaj volos labori.

Super ĉio tamen staru, ke ni estu sufiĉe idealismaj kaj samtempe sufiĉe realismaj, ke ni vidu la eblojn kaj la malfacilaĵojn. Por la fina venko de Esperanto ne estas sufiĉe, ke ni estas membroj kaj ke ni de tempo al tempo vizitas konversaciajn vesperojn. Nepre necesas, ke ni kredu propran forton kaj la forta volo fari ion. Ni scias, ke la bildo, kiun ni nun pentris estas ne rozkolora. La ĉefa koloro estas griza. Sed dependas de ni ĉiuj, ĉu la koloroj en posta pentraĵo estos pli helaj aŭ ne.

La devizo de nia Asocio estas „Fidu La Estontecon”. Sed ni nur povas fidi la estontecon, kiam ni ĉiuj estas **FORTAJ, LABOREMAJ, ENERGIAJ.**

En tiu senco ni deziras al vi ĉiuj feliĉan kaj prosperan novjaron.

Foelke de Vries

## Pri la urbo de nia 46-a

Esperantisto estas homo kun interesiĝo pri lingvoj. El multaj li tamen elektis la universalan, Esperanton. Fieras li pro la fakto, ke dialektoj ne minacas la Zamenhofan lingvon je disfalo.

Jesja, sed ĉu la esperantisto entute malŝatas dialektojn? Nepre ne! Li scias, ke iuj dialektoj sonas kiel muziko. Kore li povas ridi pri la dolĉa „g” de Wim Sonneveld kaj ridetante li aŭskultas la voĉon de Koekoek, kiam tiu estimata deputito postulas por io „bewijz'n”.

Aliaj dialektoj estas de ne-indiĝemoj preskaŭ ne kompreneblaj kaj loganton de nia provinco Frislando li povas peli al *Surioze* dirante, ke ties dialekto estas por li kvazaŭ sanskrito.

Al la malbelsonaj dialektoj apartenas tiu de la urbo Utrecht. Sed la homoj, parolantaj ĝin? Tiaj uloj! (Polekson supren. Kion mi diris?... du poleksojn supren!) Ili ne havas havenon, laŭrange la unuan en la mondo. Ili ne havas tunelo(j)n. Sed ili havas konstante-provizoran koncertejon el ligno. Ili havas la muzeon „Van Speeldoos tot Pierement”. Ili havas sian Foiron mondfaman. Kaj ili havas „Werkspoor” kaj „Demka”, kiuj bedaŭrinde pelis la urbon al la frontpaĝoj dum la lastepasintaj semajnoj.

Sed ili havas ankaŭ Anne Frank. Jes, ŝi estas ilia. La loĝantoj de la urbo de Wille-

La Asocia estraro dankas pro la multaj bondeziroj okaze de la nova jaro.

Reciproke ĝi deziras al ĉiuj siaj membroj plej feliĉan — kaj por nia laboro fruktodonan — novjaron!



brord, almenaŭ la aŭtoŝtonaj, estas ŝarĝitaj per la famo esti rigidaj, nekomunikigemaj. Ni ne diskutu pri tio. Estas vere, ke ili ne facile montras emociojn kaj pro tio ne estas tuj rimarkeblaj, ke ili estas kortuŝitaj rigardante la statuon de Anne Frank, starantan ĉe la malnova muro de la preĝejo Sankta Johano. Ofte ĉe ŝiaj bronzaĵaj piedetoj kaj ĉirkaŭ la soklo kuŝas floroj kaj plurfoje mi konstatis, ke homoj ame metis florojn sur la manojn. Ĉu sentimentale? Ne okupu vin per tia penso, sed atentu kaj se necese batalu, por ke la historio pri Anne Frank ne ripetigu. Kaj nepre staru je la 4-a aŭ la 5-a de marto venonta dum kelkaj momentoj ĉe la statueto... por ke vi ne forgesu.

## Al prospero kaj progreso servu FLE-kongreso

### Komunikoj de OKK

La unua komunikado devas esti, ke tiu OKK ne estas favorata de s-ino Fortuno. Bedaŭrinde la dato de nia kongreso koincidas kun la lastaj tagoj antaŭ la printempa Foiro en Utrecht. Pro tio estas ege malfacile trovi sufiĉe da hotelĉambroj. Jam dufoje tamen eliris apelo al la loka samideano disponigi litojn kaj matenmanĝon al unu aŭ pli da kongresanoj. Tiurilate ni estas esperplenaj.

Pri la kongresejo ĉio estas aranĝita. Ankaŭ aranĝita estas busekskurso je la sabata posttagmezo. Kiel kleriga kaj instrua ero de la kongresa tagordo servos referato fare de profesoro Minnaert, pri la temo: „Internationale samenwerking in in de sterrenkunde“. Profesoro Minnaert estas varma simpatianto de nia movado. Skribe kaj lege li regas la lingvon internacian.

En la kongresejo oni povos akiri manĝon

kaj je dimanĉo la kongresanoj manĝos komune. (Estas acetebloj panetoj, la prezoj por menuo estas f 3,50 — supo, panetoj, 2-foje kafo, frukto — aŭ f 7,50 — supo, terpomoj, viando, 2 specoj da legomoj, frukto. Kafo koston f 0,60, teo f 0,50.) Por la aliaj aferoj oni ankoraŭ aktivus. Grava malhelpo estis kaj estas malsanoj de kelkaj OKK-anoj. Ni esperu, ke baldaŭ ili denove povos partopreni en la laboroj.

P.

Petu aligilon por la 46a kongreso de FLE, kiu okazos la 4an kaj 5an de marto 1967 en Erasmushuis, Utrecht, al la Asocia sekretario: Nepveustraet 33, Amsterdam-17.

### PROPONO por nia 46a kongreso

#### 1. Kotizoj.

La Asocia estraro proponas, ke la kotizoj restu kiel decidis la kongreso en Gent 1966, kaj kiuj validas de la 1a oktobro 1966:

- f 0,85 monate por unuopaj membroj;
- f 1,15 monate por geedzaj paroj;
- f 11,40 jare por ĝeneralaj membroj;
- f 16,20 jare por ĝeneralaj membroj geedzoj.

### INSTRUA SERVO FLE

deziras al siaj gekursanoj studemon, persiston kaj feliĉon; al siaj kunlaborantoj kontentiĝon en la grava laboro por nia Movado en la Nova Jaro.

### Tuj abonu „El Popola Ĉinio“ de 1967

Jam komenciĝis kampanjo por kolekti abonantojn de 1967 por *El Popola Ĉinio*, sinteza kaj dumonata gazeto eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo. La kampanjo daŭras ĝis 28.2.1967. Ĉiu abonanto senpage ricevos belan Esperantan Kalendaron kaj ĉiu varbanto memorindan donacaĵon. Jarabono: £ 0-5-0. La koncernan faldfolion kaj provspecimenon de EPĈ oni povas peti senpage de ĝiaj diverslandaj perantoj aŭ rekte de la Libro servo de ĈEL, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Nia Libro Servo ĉiam pretas esti via peranto!

★

### „Graĵoj en Vento“

Eldono de junaj lernejoj, kiuj lernas Esperanton. Eldono por iliaj amikoj/kolegoj en eksterlando, kiuj reciproke verkas kaj desegnas por konstante eldoni „Graĵoj en Vento“.

La kajero estas la konkreta formo de unu el la bazaj punktoj por internacia lingvo: per personaj kontaktoj, ĉie en la mondo, ekestu plej bona interkompreniĝo. Petu pliajn informojn al la redaktoro: Marcel Erbetta, Rue des Pins 66, Bienne/ Biel 7, Svislando.

★

Laŭ la statistiko, kiun faris Centro de Esploro kaj Dokumentado, en la jaro 1965 disaŭdigis programojn en la internacia lingvo 25 radio-stacioj en 13 landoj. En 1964 disaŭdigis 22 stacioj en 11 landoj. Entute en 1965 estas elsenditaj 1.807 programoj kiuj daŭris 662,50 horojn, kompare kun 1.622 programoj en la daŭro de 518 horoj en la jaro 1964.

Okaze de la 60-jara jubileo de la Roterdama Esperanto-Societo „Mercurio“ la Roterdama turisma oficejo eldonis, en kunlaboro kun nomita societo, belaspektan turisman prospekton en Esperanto pri la urbo Roterdamo. La prospekto estas vaste ilustrita per multkoloraj bildoj. Interesigantoj povas peti ĝin ĉe: VVV, Stadhuisplein 19, Rotterdam-1.

Al „Mercurio“ duoblan gratulon: pro la jubileo kaj pro la atingita turisma sukceso!

★

La Ĝenerala Konferenco de UNESKO, kiu finiĝis la 30-an de novembro 1966 en Parizo decidis rekomendi al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO esplori la eblecojn dum la laborperiodo 1969-1970 per eksperta komisiono studi la bezonon kaj la eblecojn utiligi internacian lingvon apud la naciaj lingvoj por diversaj sferoj de la homa aktiveco. La demandojn oficiale levis Danujo, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedlando.

★

### Nia konsilantarkunveno

okazos en Amersfoort, De Grasheuvel, la 4an kaj 5an de februaro 1967. Kiel antaŭan fojon la Asocio invitas unu samhejmanon kun ĉiu konsilanto (kaj estrarano) je kostoj de la Asocio.

### Faulhaber-fondaĵo

Danke ni ricevis mondonacojn de:

- k-do A. Limburg, Enschede ..... f 3,50
  - k-do H. Kamans, Heerlen ..... f 7,50
  - k-dino Keuter-Netten, IJmuiden .. f 2,50
- Nia esprimo de sinceraj sentoj al la donacintoj!

### Faulhaber-Fondaĵo

ekzistas jam dum kelkaj jaroj kaj nun montriĝis dezirinde plivastigi la funkciularon.

Krome, ni devas en la regularo pli precizigi kelkajn aferojn koncerne la ekziston de la funkciuloj.

La regulo pri la Gvidado tekstas nun jene: Faulhaber-Fondaĵo estas gvidata de 5 personoj, nome:

1. Prezidanto estas la asocia prezidanto
2. Kasisto estas la asocia kasisto
3. Vicprezidanto (nun k-do Faulhaber)
4. Sekretario, gvidanto de Propaganda Servo (nun k-dino Schouten)
5. Gvidanto de Instrua Sekcio (nun k-dino Burgler)

La funkciuloj sub 3, 4 kaj 5 estas elektataj por tri jaroj. Ĉiujare, en la sama sinsekvo, unu el ili ekzistas, sed estas reelektebla. Se la foriranta funkciulo ne deziras reelektiĝon, tiam la restintaj funkciuloj elektos novan kunlaboranton, interkonsente kun la asocia estraro.

La funkciuloj kunvenos almenaŭ dufoje en ĉiu jaro, laŭ eblo en aprilo kaj novembro.”

Dum la semajnfino en Grasheuvel k-do Faulhaber jam parolis pri la funkciulara kurso, kiun ni eldonos, se montriĝas sufiĉe da intereso por ĝi.

Ĉiu funkciulo, kiu interesiĝas pri tia kurso, bonvolu sciigi tion al la sekretario de Faulhaber-Fondaĵo: Neptunusstraat 39, Haarlem.

J. J. Schouten, sekr.ino

## Fonemo kaj sono en Esperanto

Prof. E. A. Bokarev (daŭrigo)

Ni rigardu kelkajn aliajn tipajn prononcerojn, kiuj aperas pro konflikto inter du malsamaj fonemikaj sistemoj. Eble la plej okulfrapa ekzemplo estas sorto de „r” kaj „l” en la buŝo de japanoj kaj ĉinoj. En japana lingvo ne ekzistas „l”, en la ĉina — „r”. Tial japanoj kaj ĉinoj povas miksi en sia prononcado tiujn fonemojn: *rado — lado, rano — lano, revĵi — levi, rimo — limo, ripo — lipo, roko — loko, ruli — luli, ribelo — libelo, modera — modela, birdo — bildo.*

Intercetere oni devas noti, ke ankaŭ eŭropanoj ne ĉiam bone prononcas tiun „r”. Ekzemple, angloj en iuj fonetikaj pozicioj prononcas ĝin tre malforte, preskaŭ nule, neaŭdeble por reprezentantoj de iuj aliaj lingvoj. Tio povas kaŭzi miskomprenon: *verki — vekĵi, surda — suda, karto — kato, tigro — tigo, korto — koto, frako — fako, vorto — voto, prava — pava, agro — ago, prezo — pezo, grado — gado, ventro — vento.*

Iafoje en prononcado de germanoj, danoj, estonoj renkontiĝas mikso de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj: *b - p, d - t, g - k, v - f, s - z, ĝ - ĉ, ŝ - ĵ.* Tio precipe aperas, ĉar en iuj lingvoj inter elementoj de tiuj fonemparoj opozicio esprimiĝas precipe ne en voĉeco (sonoreco), sed en intenseco (forteco) de artikado de parolorganoj, kio iafoje restas neperceptebla de alilingvuloj. Ni donu kelkajn ekzemplojn de tiu mikso inter voĉaj (sonoraj) kaj senvoĉaj konsonantoj: a) *brava — prava, bubo — pupo, karbo — karmo, baki — paki, baro — paro;* b) *domo — tomo, mardo — marto, sendi — senti, dento — tendo, tento, drinki — trinki;* c) *sago — sako, logi — loki, frago — frako, vergo — verko, ŝargo — ŝarko;* ĉ) *vino — fino, valo — falo, vojo — fojo, grava — grafa, vermo — fermo;* d) *sumo — zumo, pesi — pezi, rezoni — rezoni, kaso — kazo, preso — prezo;* e) *kaĝo — kaĉo, ĝeno — ĉeno, plaĝo — plaĉo, aĝa — aĉa, vojaĝo — vojaĉo;* f) *ŝako — ĵako, ŝipo — ĵipo.*

Renkontiĝas ankaŭ mikso de afrikatoj kaj simplaj plosivoj: *c - s (colo — solo, cento — sento, peco — peso, celo — selo, kareco — kareso), ĉ - ŝ (ĉamo — ŝamo, ĉelo — ŝelo, ĉia — ŝia), ĝ - ĵ (aĝo — aĵo, ĝibo — ĵibo.)*

Ni tuŝu plue mikson de dentaj kaj palataj frikativoj, kiu aperas iafoje en prononcado de skandinavo, mikso de *c - ĉ, s - ŝ, ĝ - z:* a) *celo — ĉelo, peco — peĉo, placo — plaĉo, caro — ĉaro, maco — maĉo;* b) *muso — muŝo, pasi — paŝi, vesto — veŝto, spino — ŝpino, kaso — kaŝo;* c) *ruĝa — ruza, rifuĝi — rifuzi, rezino — rezino.*

Kiel lastan pekon kontraŭ esperantaj fonemoj mi tuŝos nuligon de „h” en iafoja parolado de francoj, italoj kaj kelkaj aliaj nacioj, kio ankaŭ povas produkti miskomprenon: *horo — oro, haro — aro, homaro — omaro, hordo — ordo, hajlo — ajlo,*

*halo — alo, hardi — ardi, havo — avo, hoko — oko.*

Principe multe malpli grava estas normigo de prononco de alofonoj, t.e. de diversaj variantoj de fonemoj. Estas indiferecitan ekzemple, ĉu oni prononcas palatizitan (molan) aŭ nepalatizitan (malmolan) „ŝ”, „ĉ” en la vortoj *ŝipo, ĉelo;* voĉan aŭ senvoĉan „h”, „j” en la vortoj *homo, fojno.* Ordinare ni eĉ ne perceptas la fonetikan diversecon de tiuj alofonoj, de diversaj variantoj de la samaj fonemoj. Pro tio tiel nomata problemo pri vasteco kaj longeco de esperantaj vokaloj estas tute malprava kaj sensignifa. Esperanto ne havas diferencon inter vokalaj fonemoj laŭ ilia vasteco kaj longeco, kaj tiun diferencon inter koncernaj alofonoj povas percepti nur ano de tiu lingvo, kie ekzistas tia diferenco inter la fonemoj. Iafoje tamen estas grava la demando pri alofonoj. Ekzemple, rusoj ofte moligas (palatizas) dentalan „t” en pozicio antaŭ vokaloj „e” kaj „i”, kaj en tiu pozicio ĝi povas esti perceptata kiel varianta de „c”, sed ne de plosivo „t”: *timo — cimo, tindro — cindro, titro — citro, tiklo — ciklo, tiro — ciro, tia — cia.* Do uzado de palatizita alofono de „t” ne estas rekomendinda. Pro analogio eble tiu rekomendo povas rilati ankaŭ al aliaj dentaj plosivoj „d” kaj „n”, kvankam la supre citita kaŭzo tute ne rilatas al tiuj fonemoj.

Lastloke ni okupiĝu iom pri asimilado de sonoj en parolĉeno. Distanco proksimaj sonoj povas influi unu la alian iurilate. Se posta sono influas la antaŭan, asimilado estas nomata regresiva: *ekzisti > egzisti;* se antaŭa sono influas la postan, asimilado estas nomata progresiva: *diversa > diverza.* Ĉar Esperanto estas fonemika lingvo kaj ĉiu aparta fonemo en ĝi ne devas koincidi kun iu ajn alia, la proceso de asimilado ne devas esti rekomendata. Sed unu el la formoj de asimilado nome la regresiva, estas disvastigita en tre multaj lingvoj kaj pro tio estas tolerebla kaj permesebla: *absurda > apsurda, ekzisti > egzisti, diŝiri > diŝŝiri.* Male pro progresiva asimilado: ĝi ne nur ne estas rekomendinda, sed ne devas esti eĉ permesebla: *univerzitato, inzekto, diverza ktp.*

Ne estas rekomendataj, sed eble nur tolerataj ankaŭ kelkaj aliaj eventualaj fonetikaj procedoj en parolĉeno, kiuj povas aperi en esperanta prononco pro influo de naciaj lingvoj: a) transformiĝo de sonkombinoj „ng” en uvulan „n” (*sango, atingi*); b) palatizo de konsonantoj antaŭ „j” (*sinjoro, panjo*); c) apero de „j” inter vokaloj (*ĉielo > ĉijelo, piedo > pijedo, mia > mijajo*).

Do ni povas konkludi, ke kiam ni parolas pri unueca prononco en Esperanto, oni parolas precipe pri strikta diferencigo de fonemoj, sed plej ofte oni ne povas insistĵi, ke iu speciala alofono estu sola reprezentanto de la koncerna fonemo. Do ni rigore obeu la principon de fonemikeco, kiu estas esence grava de l’vidpunkto de interkompreno, sed estu toleremaj al tio, kio estas sensignifa de tiu vidpunkto.

El „Nuntempa Bulgario” n-ro 11/1966

Mi dankas ĉiujn, kiuj sendis al mi siajn bondezirojn por la nova jaro, kiujn dezirojn mi tutkore recipokas. Same kiel vi, ankaŭ mi esperas, ke ni povos daŭrigi nian rubrikon kun la sama sukceso dum kelka tempo ankaŭ, sed tio eblas nur kun via helpo!

La „duobla sablohorloĝo” estis tia helpo. Tamen ĝi ne vekis la interesigon, kiun ĝi meritas: nur 15 solvojn mi ricevis, nome de S. Aarse, J. H. Bredenoord, L. Bruyn-Bas, J. R. van Eynde, H. Hooghuis, J. G. v. Hulst-v. Maasdam el Haarlem (bonvenon!), D-ro Kalocsay el Budapeŝto, H. Keuter, Mia Maatman, J. P. Ponger el A’dam (bonvenon.), A. Reiné, F. Smit, R. Vos-Uil, E. Weiberle kaj de J. Kuijpers el R’dam, al kiu mi povis donaci la premion kun miaj gratuloj.

Ke ne pli da solvoj eniris leterkesteton ni eble devas artibui al la Sankta Nikolao-festo, kiun ni facile povas kulpigi ankaŭ pri tio, ke la ensendaĵoj laŭkvalite ne montris la altan nivelon, kiun ĝi kutime havas. Oh jes, ĉiuj solvintoj atentis la ununuran regulon de „sablo-horloĝa-enigmo”, tamen mankis ofte la zorgoplena, fantaziriĉa kompilado, kiu spicas la cerbumadon, la kaprompan laboron. Kial ekz. *parieto, partio, parto, paro* k.t.p. kun la samaj vortoj en la ĝemela sablo-horloĝo, nur inverse ĝis *patrico?* Kial *manioko, maniko, manko, mano* k.t.p.? Ekzistas tamen pluraj vojoj kiuj kondukas al Romo. Ekzemple: *parieto, trio, portio, tipo* k.t.p. kaj *manioko, kimono, konio, inko*, k.t.p. Sankta Nikolao petis kaj plendis por indulgo, dume parolante en sia profunde basa voĉo pri la peza laboro de la versfarado, Mi cedis, mi simple ne povis ne cedi kaj mi allasis ĉiujn al la lotumado por la premio, kun la nura escepto de D-ro. Kalocsay, ĉar li skribis: „Mi sendas la solvon ne pro tio, ĉar mi volas ĉasi la premion el antaŭ la nazo de la ceteraj solvintoj, sed precipe pro tio, por ke vi sciĵu, ke vi donacis al mi agrablan tempopasigon.” Nu, mi opinias, ke tio estas forta instigo por partopreni pli multnombre en nia konkurso.

La novan emigmon mi dankas al k-do S. Aarse. Ĝi havas klasikan modelon; ĝi vere estas enigmo el „la bona malnova tempo”, ne simpla, sed interesa kaj instrua. Se vi sukcesos en la solvado, vi akiros eldiron de *Julio Baghy*, tutan frazon de 81 literoj. Jen, kiel vi povas trovi tiun amason da literoj, se vi nur bone atentis la difinojn:

- 47, 23, 40, 46, 77, 62, 2, 73 = forta, foje eĉ incita impresoj sur publikon.  
51, 1, 30, 35, 36, 44, 52 = koleri disputi.  
39, 71, 49, 19, 80, 14 = mortigi per senigo de aero.  
1, 18, 10, 15, 58, 50 = substanco, kiu detruas la funkciojn de la vivo.  
7, 32, 13, 8 = kompleta.  
66, 69, 12, 17, 13, 45, 20, 63 = ano de severmora protestanta sekto.  
42, 19, 68, 7, 43, 64 = grava libro de Lanti.  
16, 48, 53, 81 = insekto, kies piko kaŭzas jukadon.  
34, 41, 65, 9, 21, 79, 57, 4 = homo, kiu ne plu laboras sed tamen ricevas pagon.  
25, 74, 52, 33, 56, 81 = pruvo ke akuzito ne estis ĉe la loko de la krimo.

VERVOLG OPGAVE 7

9. Ook enkele andere Madurodam-attracties zijn verzonden.
10. De Gouden Koets met volgrijtuigen, een kermis met een draaimolen, een muziekmakend fanfare-orkest, een complete gracht met een rondvaartboot, een sleepboot, de „Groene Draeck” van Prinses Beatrix en zelfs een bloembollenveld.

OPGAVE 1

Ons weer

Januari: Ja, wat wil je, het is altijd de koudste wintermaand.

Februari: Ja, wat wil je, veel winters beginnen pas werkelijk in februari.

Maart: Ja, wat wil je, de maartse buien!

April: Ja, wat wil je, het is nog de tijd van het jaar, april geeft zelfs nog wel eens een witte hoed.

Mei: Ja, wat wil je, deze noordewind waait vaak tot de langste dag, en het is slechts mei.

Juni: Ja, wat wil je, de zomer begint pas de 21ste juni.

Juli: Ja, wat wil je, de laatste jaren regent het steeds vaker in juli.

Augustus: Ja, wat wil je, augustus is altijd de regenmaand.

September: Ja, wat wil je, het is september, de zomer is bijna voorbij.

Oktober: Ja, wat wil je, in oktober kun je niet veel meer verlangen.

November: Ja, wat wil je, november is berucht wegens zijn stormen.

December: Ja, wat wil je, kou en regen zijn normaal in deze tijd van het jaar.

VERTALING VAN OPGAVE 7

1. Duafoje la nederlanda turisma allogilo numero unu iris al Novjorko: parto el Madurodamo.
2. La urbeto denove estas ekspozata en la K.L.M.-oficejo, Fifth Avenue, de la dudektria de novembro ĝis la sesa de januaro.
3. La kaŭzo de la ripeto estas la granda interesa en la pasinta vitro.
4. Venis centmil vizitantoj kaj milionoj da preterpasantoj povis rigardi tra la grandaj fenestroj.
5. La kolekto estas iom alie kunmetita ol en la antaŭa jaro.
6. La areo estas malpli granda, tiel ke oni ekhavas iom pli da spaco en la oficejo por ĉion bone priligi.
7. Plej granda estas la Pacpalaco.
8. Krome iris al Novjorko i.a. la Frans Hals-muzeo, ĝinfarejo, frisa farmejo, kelkaj varejoj, preĝejo, graĥtodomoj kaj kastelo.

72, 38, 61, 45, 64, 53, 27, 76, 4 = aro da friponoj.

6, 54, 68, 24, 45, 28, 37, 43 = akra moko.  
31, 67, 70, 78, 5, 22, 62, 63 = mallonga frazo, enh. moralan principon.

11, 44, 59, 74, 52, = lupbleki.

29, 75, 3, 8 = antaŭe ne ekzistanta.

26, 55, 60, 62, 56 = manĝi kun bruo.

Sendu vian solvon al J. W. Minke, Vee-teeltstraat 144, Amsterdam-6 plej laste 15.2.67. La stoko da premioj ankoraŭ ne estas elĉerpita!

Ĉu Esperanto vere vivas?

J. Ph. Punt

OPGAVE 1

Beter een half ei dan een lege dop

Ik geef toe, dat Esperanto nog niet kan concurreren met Anton Geesink, Tiemen Groen, Pieters Graafland en andere groten uit de sport, maar wel meen ik, dat de met de internationale taal bereikte resultaten niet minder sensationeel zijn. Na een bijna tweeduizendjarige spraakverwarring is het immers mogelijk gebleken, dat mensen uit meer dan veertig landen verspreid over alle werelddelen, vlot met elkaar kunnen spreken niet alleen over koetjes en kalfjes, maar over de gehele reeks van menselijke interessen, met inbegrip van atoomsplitsing, ruimtevaart en geboortebepaling. Aan de andere kant is de taal van Zamenhof al zo populair en al zo ver doorgedrongen in het leven van alledag, dat het niet te gewaagd is te beweren, dat zij zich een eigen plaats heeft veroverd in de wereld.

Een van de argumenten van de tegenstanders is, dat Esperanto kunstmatig is, in tegenstelling tot de natuurlijke talen die worden geboren, groeien en volwassen worden. We zullen nu niet gaan praten over de vraag wie gelijk heeft, maar de zaak van de zuiver praktische kant bezien. Iemand die op reis gaat bereidt die reis voor. Zo ook de esperantisten. Zij nemen bijtijds contact op met geestverwanten in het buitenland en zijn er zeker van, dat zij zich in het te bezoeken land vrij kunnen bewegen, niet gehinderd door taalmuren. En wat doen de kampioenen van de natuurlijke talen? Zij regelen voor zich het verblijf in een hotel. Dat gaat dan als volgt. Aan hotel „Zeester” sturen zij een telegram met de tekst:

ALDUA — KIN — MERVU — RAFYG — AERO. Dat betekent: 1 kamer met 1 tweepersoons bed, 1 kinderbed, kamer met uitzicht op zee, aankomst woensdagavond, afhalen van het vliegveld.

Men begripe ons goed. We hebben niets op deze kode tegen; die is doeltreffend, maar hij maakt tegelijk het argument van de kunstmatigheid van Esperanto waardeloos. Aangekomen in het vreemde land zijn de esperantisten gelijkberechtigigde mensen. Zij kunnen het hoogste profijt trekken uit hun verblijf over de grenzen, want zij kunnen vrijuit met de mensen spreken. De gemiddelde aldukinmervurafygaero-mens kan stotterend en „met handen en voeten” contact hebben met hotelpersoneel, taxi-chauffeurs en marktkooplieden. Om telegramkosten te besparen gebruikt hij kode-woorden. Bij het leren van talen verspilt hij koppig tijd, geld en energie. Geef mij dan maar Esperanto... kunstmatig of niet.

★

VERTALING VAN OPGAVE 6

Ne nur por havigi plezuron al la filojlernejoj, kiuj tiom volonte volas registri „la elbloviĝon de vapore” (varmegan lutilon oni metu en ujeton da akvo), sed por ebligi al familianoj lude lerni fremdajn lingvojn, venki parolofobion (paroltimon), kritike aŝkulti propran muzikadon, registri subite naskiĝantajn ideojn kaj familian diskutadon kaj aranĝi propran trezorujon el

Esploru vian scion!

H. Kuijt

OPGAVE 1

Waarom slapen we nou juist in een bed?

Slapen kun je ook in een hooiberg, uitrusten ook in een heerlijke tuinstoel. Een bed is daar echt niet voor nodig. Het is natuurlijk wel prettig, zo gemakkelijk, heerlijk zacht en je wordt de volgende morgen niet wakker met stijve leden, die eerst weer recht getrokken moeten worden.

Het belangrijkste is uiteindelijk de warmte, die een bed levert.

En bed dient de mens om hem te beschermen tegen nadelige invloeden van het klimaat, om een behaaglijke slaaptemperatuur te krijgen.

Zoals bekend is, werkt gedurende de slaap het lichaam van de mens weinig intensief, organen verminderen hun werking, de bloedsomloop wordt trager en ook de warmte, die het lichaam produceert, wordt minder. Daarom is de bescherming van een bed beslist nodig. Onze grootouders wisten dit al, getuige de vele bedsteden en alkoven, die we vinden in oude huizen.

Dit systeem van warmte bewaren was echter verre van ideaal, omdat de afsluiting vaak te goed was en er dus van ventilatie geen sprake kon zijn; het was een bedompte, benauwde beweging.

Tegenwoordig, dank zij de voortschrijdende wetenschap, ook op medisch gebied, heeft men zeer goed dekens weten te ontwikkelen, die wel de warmte vasthouden, maart toch voldoende ventileren.

★

VERTALING VAN OPGAVE 7

Mi estis en Hispania vilaĝo kie oni povas trinki vinon en freŝa tendo.

Estas la homoj de la kamparo kiuj ĉi tie verŝas la ruĝan vinon en la gorĝon el speco de vasta vitra botelo kun longa malvasta enbuŝaĵo, kiun neniu tuŝas per sia buŝo. Ĉi tiun botelon oni nomas „porron”.

Ĉi tio estas higiena trinkmaniero.

Ekzistas ankaŭ kruĉoj el argilo de la sama speco. Ĉi tiuj nomiĝas „bodigos” kaj ili estas uzataj por akvo. Mi bone memoras, kiel mi, ĵus veninte en la vilaĝon, staris soifa apud fontano. Iu kamparano rimarkis mian soifon kaj prezentis al mi sian „bodigon” por trinki el ĝi. Kaj barbare, kiu mi estis, mi metis la kruĉon inter miajn lipojn!

Neniam mi forgesos, per kiaj okuloj la viro rigardis kaj ke lia konsterniĝo tiu-momente estis al mi tute ne klarigebla. Mi neniam sukcesis regi la arton de trinkado el ĉi tiuj kruĉoj; plejofte mi jetis la akvon meze en mian viziĝon.

En Hispanio mi neniam vidis ebrian viron. Hispanoj trinkas multe da vino sed kun modero. Ebriecon oni konsideras en ĉi tiu vinlando la plej granda malhonoro.

karaj sonoj kun unuaj parol- kaj lernoklopodoj, amuzaj diskutoj ĉirkaŭtablaj kaj la voĉoj de pliaĝuloj ne plu vivantaj. La riĉa, sorĉa, fantazia mondo de la sonoj larĝe malfermiĝis antaŭ la posteuloj de inventisto Valdemar Poulsen kaj ties samtempuloj.

En la Granda Soveta Enciklopedio, sub la titolo *Tutmonda lingvo* — vol.9, pĝ 306 — estas esprimita aserto, ke strebo al kreo kaj enkonduko de lingvo tutmonda (resp. internacia) estas utopio, kaj inter aliaj konsideroj pri neebleco krei vivantan esprimkapablan lingvon kun kvalitoj de naciaj lingvoj, oni emfazas ankaŭ supozatan mankon de sinonimoj: „Malesto de plursignifeco de la vortoj, malesto de idiomaĵoj, de sinonimaro, de afekcia leksiko — unuvorte de ĉiuj rimedoj, kiuj donas elvokivecon kaj elastecon al natura vivanta lingvo, kondukus tian lingvon (artefaritan) al la grado de tute neperfekta surrogato de vivanta lingvo”.\*)

Mi ripetas: tiuj ĉi asertoj estas bazitaj nur sur supozoj. Ĉiu, kiu konas Esperanton kaj uzas ĝin, scias kaj sentas, ke al ĝi ne mankas la montritaj elementoj. Ne mankas, do, ankaŭ sinonimoj — eble en iu rilato ne en kvanto kiel en tiu aŭ en alia nacia lingvo, tamen ili ekzistas kaj donas — vice kun aliaj elementoj — eblojn por nuancataj kaj subtilaj esprimoj. Eĉ en certa direkto, precipe dank' al afiksoj (mal, ebl, em, re, ig, ind ktp.) ĝi povas disponigi tre multajn sinonimojn kun specialaj nuancoj: akceli — aktivigi — agigi — kuraĝigi — sproni — entuziasmigi ktp.; speciale — aparte — precipe — ĉefe — pleje ktp.

Dum la aplikado kaj evoluo de Esperanto formiĝis kaj stabiligis la signifampleksoj de ĝiaj vortoj, stabiligis ankaŭ sinonimoj, kiuj riĉigis ĝian esprimpovon. Ilia enesto ne devas esti konsiderata kiel negativa kaj nedezirinda fenomeno.

Kiu deziras uzadi la Internacian Lingvon ne nur kiel praktikan konvencian kodon por komunikado de simplaj, elementaj informoj, sed kiel lingvon por libera, senĝena komuniĝo, por esprimado de ĉiuj bezonoj de la psika aktiveco, tiu ne devus kontentigi nur per ellerno de la lingvaj elementoj de Esperanto, sed devas lerni ankaŭ la vortojn en ilia ĝusta signifo kaj en iliaj plurflankaj kromsignifoj.

Estas kategorio de *absolutaj sinonimoj* — ordinare du, sed foje ankaŭ pluraj vortoj, kiuj havas plene saman signifon kaj estas uzablaj la unu anstataŭ la alia. Tiaj estas, ekzemple, *lingvistiko* kaj *lingvoscienco*. Ofte la uzo de unu aŭ de alia el ili baziĝas sur ilia aparteneco al tiu aŭ alia stilistika tavolo (konversacia lingvaĵo, scienca, literatura, poezia, kancelaria, ekonomia, vulgara ktp). Tiaj estas, ekzemple, la sciencaj nomoj de plantoj, malsanoj, partoj de l'organismo ktp, paralele kun samsignifaj popularaj nomoj: *galanto* — *neĝofloro*, *miozoto* — *neforĝesumino*, *abdomeno* — *ventro* ktp. Ekzistas ankaŭ kategorio de *gramatikecaj sinonimoj* de la tipo: *patra domo* — *domo de patro*, *plezure* — *kun plezuro* k.s. La signifoj koincidas, oni povas rajte uzi ĉu tiun, ĉu alian. Gvido ĉe elekto povas esti, interalie, la eŭfonia principo: sento pri bonsonco de la tuta frazo, en kiu oni uzus tian esprimon (ĉu en ĝia kombino kun la ceteraj partoj de la propozicio riceviĝas facile, glate elparolebla, bonsona, eleganta frazo).

Ni tamen haltigos nun nian atenton al la pli granda kaj interesa grupo de sino-

nimoj: tiuj, kiuj ne plene kongruas en siaj signifoj. Tio estas precipe *plursignifaj vortoj*. Tiaj vortoj formas *sinoniman vicon* (ĉenon, linion). En tiu ĉi vico ili povas diferencii inter si ĉu per pliigo de la grado de la esprimita nocio, ĉu per esto aŭ malesto de figura aŭ de emocia, elvokiva flanko. Plursignifa vorto havas unu centran (kernan) signifon kaj ĉirkaŭ ĝi kromajn signifojn aŭ nuancojn. Kun la ceteraj vortoj de la sinonima vico ĝi povas esti sence (kaj uze) proksima per iu el siaj signifoj — ĉu per la kerna, ĉu per kroma. Jen unu sinonima vico: *ricevi* — *akiri* — *profiti* — *gajni*.

Ilia komuna kerna signifo rilatas al io, kio venas en posedo de la preparolata subjekto. Sed ĉiu membro de la ĉeno havas ankaŭ ion plian, ion specifan, kio diferencigas ĝin de la ceteraj. Se ni prezentus ilin en substantiva formo, en la vico envenus ankaŭ *utilo*: Kian gajnon/profiton/utilon vi havus el tio? En tia esprimo jam *ricevo* ne estus uzbla.

Unu vorto — membro de la sinonima vico — per iu el siaj signifoj povas aparteni al unu vico, per alia signifo — al alia vico; la ceteraj vortoj de la unua kaj de la dua vico ne estas sinonimaj inter si. Alivorte, la sinonimaj linioj (vicoj) povas en unu punkto trakruĉiĝi: tiu punkto estas la vorto komuna al la du vicoj. Jen ekzemploj:

## ĝusta

- 1-a vico: preciza — ekzakta  
 2-a vico: korekta — (laŭ) regula — sen-erara  
 Ĝusta / korekta / regula / sen-erara / prononco.  
 Veni en ĝusta tempo.  
 Ĝuste vin mi atendis.

## intereso

- 1-a vico: sciemo — scideziro  
 2-a vico: utilo — profito — gajno — bono ktp.  
 Havi intereson pri geografio.  
 Materiala (morala) intereso.  
 La intereso de nia Movado.

## absoluta

- 1-a vico: sendependa — memstara  
 2-a vico: tuta — plena — senkondiĉa — nekontestebla — senescepta — nepra.  
 Absoluta regopovo. / Absolutismo.  
 Absoluta plimulto / konsento / silento / kondiĉo ktp.  
 Absolute nenion mi komprenis.  
 (Kaj la terminoj el la sfero de scienco: absoluta alkoholo / nulo / nigra korpo k.s.)

La ĝusta konkreta signifo de vorto manifestiĝas plej klare en ĝia ligo kun aliaj vortoj, kun kiuj ĝi formas vortajn (esprimajn) *kompleksojn* — ĉu ordinarnajn, ĉu frazeologiajn. Ofta kompleksigo, de iuj vortoj fariĝas kutima, konstanta kaj tiel formiĝas *stabilaj frazeologiaj kompleksoj*. La materio pri la vortaj kompleksoj kaj ĝenerale pri la ebleco formi kompleksojn de vortoj estas grava parto de la semantiko. En iuj naciaj lingvoj estas esploritaj la vortkompleksoj, estas kolektita fakta materialo, kaj oni eltiras konkludajn principojn, laŭ

kiuj kreiĝas kaj evoluas tiaj esprimoj. Estas amasigita jam sufiĉe granda literaturo pri tio. En Esperanto sistemaj studoj en tiu ĉi direkto ankoraŭ ne estas faritaj. Tamen en la frazeologio, donita en la Plena Vortaro, ni povas trovi utilajn indikojn pri la signifa enhavo de la vortoj kaj pri alia natura kaj konvena kompleksebleco. Ĝenerale, per la vortkompleksoj, donataj kiel ilustra materialo (ekzemploj) ĉe la interpreto en la vortaroj, oni plej trafe povas difini la signifon(j)n de vorto kaj la diferencojn inter la sinonimaj vortoj.

Kompleksoj estas plej bona kaj fidinda bazo por atingi ĝustan signifon de vortoj, apartenantaj al unu sinonima vico, kiel ni vidas el la ekzemploj donitaj supre.

Ankaŭ apudmeto de vorto kun kontraŭa signifo (plej ofte formata per la prefikso *mal*) helpas por klarigi la ensencon de la signifo de vorto kaj la diferencon inter tiu lasta kaj ceteraj membroj de la respektiva sinonima vico. Por tia celo povas kontribui ankaŭ uzo (en kompleksoj) de radiko en pluraj gramatikaj formoj.

La sistema esplorado de kompleksebleco de la vortoj en Esperanto prezentas ankoraŭ virgan kampon. Ĝi atendas „sian majstron”. Mi estus feliĉa, se per jena artikolo mi akcelus kaj ambiciigus klarajn junajn samideanojn, kiuj dediĉus sin al tiu nobla tasko. Ili divas sisteme studi Esperanton en ĝia literaturo — antaŭa kaj nuna — direktante sian atenton ĝuste al vortkompleksoj kaj faktoj pri uzoj de sinonimoj. El la rezultoj de tia laboro la esperantistaro havos grandan utilon; per ili oni povos difini ĝuste la signifamplekson de apartaj vortoj, korekti enlasitajn deviaĵojn, vidi la influon de iuj naciaj lingvoj sur la formadon de kompleksoj en Esperanto (kaj per ili sur korektan aŭ eraran uzadon de iuj vortoj en iu aŭ alia senco). Krome, oni povus starigi iom post iom gvidajn regulojn por bona, sekunda maniero de kompleksigo de la vortoj, por atingi klaran esprimadon, bonan stilon.

Fragmente ĝis nun estis donataj klarigoj pri la signifa amplekso de iuj vortoj kaj speciale pri la uzo de iuj sinonimoj. Tiaj notoj certe estas utilaj kaj povos kontribui por la atendata kaj dezirata sistema studado, pri kiu mi ĵus parolis. En la pasintaj jarkolektoj de „Nuntempa Bulgario” estas publikigitaj malgrandaj enpresaĵoj de tia karaktero. Ni esperu, ke tiu ĉi praktiko daŭros plu.

A. D. Atanasov (Ada)

El: *Nuntempa Bulgario*

\*) Tamen la Redakcio de la Encklopedio evoluis en la kompreno pri tiu problemo, kaj en vol. 49, sub titolvorto *Esperanto* ĝi jam donas pozitivan pritakson pri la lingvo, informas pri ĝia strukturo, gramatiko, vortfarado, leksika konsisto, plue pri ĝia aplikado, disvastigo, ĝiaj literaturo kaj periodaĵoj, kaj interalie asertas, ke „ĝia vortara konsisto iom post iom vastiĝis, en ĝi ellaboriĝis speciala terminologio, kreiĝis konstantaj (stabilaj) frazeologiaj parolturnoj”.

F. Faulhaber:

NE TIEL, SED TIEL ĈI!

Konsilaro pri stilo

Prezo f 4,00.

Ĉe nia Libro-Servo.

„Nun mi pli kaj pli timas, ke nia poezia lingvo pli kaj pli deflankiĝas de la ĉiutaga parolata lingvo ne nur gramatike, sed ankaŭ vorte. Eble unu tagon la nova Esperanto-poezio estos komprenata nur de la poetoj, kaj eble pli poste, nur de la verkinto mem.

En la brila traduko de D-ro Kalocsay de „Reĝo Lear” oni renkontas jenajn vortojn: *ĉipa* (malmultekosta), *hati* (malami) k.a. kiuj estas evidente laŭprononce transplantitaj en Esperanton el la angla lingvo. Ĉu nia granda Kalocsay ne povis elĉerpi ion egalan el la jam ekzistanta vort-trezoro por anstataŭigi ilin? S-ro Gregor saĝe konkludis en sia recenzo en „Heroldo” (5/66): „Ĉi tiuj radikoj povas efektiviĝi ian poezian etoson; sed estas treege grave, ke ili restu limigitaj al la poezio kaj ke esperantistoj ne enlasu ilin en la prozan aŭ parolatan lingvon.”

En Esperanto jam svarmas tiom da neologismoj, kiuj jam maltrankviligis kaj konfuzis multajn esperantistojn. Eĉ „Suplemento” de P.V. kompilita de Prof. Waringhien kaj glosioj en „La Nica Lite-

ratura Revuo”, „Monda Kulturo” k.a. ne sukcesis registri ĉiujn novajn vortojn, kies nombro daŭre kreskadis.

Ni esperantigu la nuancojn kaj la stilojn de la tradukataj verkoj, sed ne la nacilingvaj vortojn kaj esprimojn fremdajn al alinaciano! Niaj aŭtoroj kaj tradukistoj elĉerpu ĉion eblan el la jam ekzistanta vort-trezoro por esprimi sin. Ili enkonduku neologismojn nur tiam, kiam la koncerna vorto ne havas ion egalan aŭ similan en Esperanto (Ekzemple: *lio*, *daŭŝio*, *tenoo* kaj la nomoj de naciaj apartaĵoj).

Mi tute ne estas kontraŭulo de neologismoj. Tamen, doni plenan rajton al la t.n. „libera evoluado” signifas displitigi la unuecon de nia lingvo kaj ĝin igi dialektoj kaj fine pereigi nian lingvon. Gardi la purecon de nia poezia lingvo estas la devo de ĉiuj poetoj, kiuj verkas en Esperanto.”

Armand Su (Ĉinujo)

(El: Heroldo de Esperanto)

Versajne sub influo de sia gepatra lingvo kelkaj aŭtoroj akcentas nenecese iun vorton aŭ frazparton, ekz. per la vorto „mem”:

1. *Du, tri knaboj pro timo forkuris, ne sciante mem, kial ili timis.* (Twee, drie jongens liepen uit vrees weg; waarvoor ze bang waren, wisten ze zelf niet).

„Mem” estas ĉi tie superflua. (Ankaŭ „zelf” estas superflua, sed tio estas nederlanda lingvo-uzo).

„Mem” servas nur, por insisti pri la nealieco kaj identeco de la koncernata persono aŭ afero, ekz.: *mi devas mem ĉion plenumi; la prezidanto mem preparas la objekton; mi eĉ mem uzas tiujn vortojn* (Z.). En la ĉi supra frazo (1) tiu insisto ne estas necesa: sen „mem” la frazo estas samsignifa:

*Du, tri knaboj pro timo furkuris, ne sciante kial ili timis.*

En la jena frazo „mem” estas ĝuste uzita:

*La patro riproĉis al sia filo, ke li ne scias, kiam naskiĝis Galilei, sed poste montrigis, ke la patro mem ne scias tion.* (De vader verweet zijn zoon, dat hij niet wist, wanneer Galilei geboren werd, doch later bleek, dat de vader het zelf niet wist).

2. *Per tiuj pensoj ŝi klopodis trankviligi sin mem* (Met deze gedachte trachtte zij zichzelf gerust te stellen).

La signifo restas sama sen „mem”:  
*Per tiuj pensoj ŝi klopodis trankviligi sin.*

Sed en jena frazo ĝi estas ĝuste uzita:  
*Per tiuj vortoj ŝi klopodis trankviligi la virinon kaj ankaŭ sin mem.*

3. *Vi bezonas nenion riproĉi al vi mem.* (U hebt uzelf niets te verwijten). Forlaso de „mem” ne ŝanĝas la signifon:  
*Vi bezonas nenion riproĉi al vi.*  
Sed ĝuste uzita ĝi estas en:  
*Vi devas tion riproĉi al li, sed ne al vi mem.*

Ankaŭ en jena frazo „mem” estas uzita korekte:

4. *Li fidis neniun, eĉ ne sin mem.* F.F.

en Esperanto uzis la tielnomatajn karakterajn finaĵojn („o” de la substantivo, „a” de la adjektivo kaj „e” de la adverbulo) por transformi la vortspecojn unu en la alian laŭ ĝeneralaj reguloj, Saŭmjan starigis kompletan tabelon de ĉiuj eblaj derivitipoj de vortoj de unu vortspeco el vortoj de aliaj.

Kompleta mi ne estis; mi mem ne legis la tutan literaturon pri transformata lingvistiko. Bonan literaturliston oni povas trovi malantaŭe ĉe Katz kaj Postal.

Literaturo:

N. Chomsky: Syntactic structures, 's Gravenhage 1957.

J. J. Katz kaj P. M. Postal: An integrated theory of linguistic descriptions, Cambridge, Massachusetts, 1964.

R. B. Lees: The Grammar of English Nominalizations, Supplement to International Journal of American Linguistics, Bloomington (Indiana) 1960.

S. K. Saŭmjan: The applicational generative model, Foundations of language (revuo), aŭgusto kaj novembro 1965, Dordrecht, Struktturnaja lingvistika, Moskvo 1965.

Dr. W. A. Verloren van Themaat  
el Interlingvistika Informa Servo

## Esperanto kaj transformata lingvistiko

Kiel mi eksplikis en alia, ĝis nun ne publikigita artikolo „La lingvistika teorio kaj la lingvoj artefaritaj”, ĉiu planlingvo estas rekte aŭ nerekte bazita sur lingvistika teorio kaj ĝenerale la skemaj planlingvoj sur la *strukturismo*, laŭ kiu ĉiu fazo de lingvo povas kaj devas esti analizata sendepende de ĝia historio, kaj la naturalismaj sur la *historiismo*, kiu analizas ĉiun fazon de lingvo helpe de ĝia historio. Tre moderna formo de struktura lingvistiko estas la transformata lingvistiko. Tial ĝia studo estas tre rekomendinda al lingvistoj-esperantistoj por pli bone kompreni la strukturon de Esperanto.

Fundamenta verko de tiu skolo estas „Syntactic structures” de N. Chomsky. En la transformata lingvistiko pli komplikaj frazoj (aŭ vortoj) estas akirataj per transformoj de pli simplaj simbolvicoj laŭ fiksitaj reguloj. Tiu simbolvicoj (krom kompreneble la fina frazo aŭ vorto) rajtas enteni ankaŭ simbolojn, kiuj mem ne povas funkcii kiel vortoj aŭ vortvicoj (ekz. indikojn de vortspecoj, kiel substantivoj kaj verboj). Ekz. la frazo „la homo ĵetas la pilkon” estas formita jene (la vortoj estas skribitaj per malgrandaj literoj, la ceteraj simboloj per grandaj):

ARTIKOLO	FRAZO		FRAZPARTO	
	SUBJEKTO	VERBA	VERBA	OBJEKTO
ARTIKOLO	SUBSTANTIVO	PREDIKATO	OBJEKTO	
		VERBO	ARTIKOLO	SUBSTANTIVO
la	homo	ĵetas	la	pilkon

La plej grava verko el tiu skolo pritraktanta kune la sintakson kaj semantikon estas „An Integrated Theory of Linguistic Descriptions” de Katz kaj Postal. Tia transformata lingvistiko produktas vortojn kaj frazojn prefere per transformo de vortoj aŭ frazoj sinonimaj aŭ kun signifoj intime ligitaj, ekz.

la viro kuras... la kuro de la viro (komparu: la kuro de la viro = *la fakto* ke la viro kuras).

Ĝuste la *semantiko* de la transformata lingvistiko estas tre grava por la esperantistoj, ĉar ĝi povigas ilin eble plej ekzakte esplori, kiom en Esperanto kun regula rilato en *formo* estas ligita regula rilato en *signifo*, precipe en la derivado (vidu R. B. Lees: „The Grammar of English Nominalizations”).

Ĝenerale la postulon, ke al analoga rilato laŭ formo respondu analoga rilato laŭ signifo (ekzakte difinebla per ĉirkaŭskriba skemo), ekz. Ido plenumas pli ol Esperanto. Tio ne estas konstato plivaloriganta unu sistemon kompare kun la

alia. Tiun pli grandan analogecon inter la rilatoj de formo kaj signifo klarigas la komuna origino de Ido kaj de la transformata lingvistiko el la matematika logiko. La ĉefaŭtoro de Ido estis la matematika logikisto Couturat. En formaligitaj matematikaj sistemoj korekte formitaj formuloj estas formataj per transformoj de pli simplaj. La transformata lingvistiko originis per la apliko de tiu metodo al la lingvistiko.

Estas rimarkinde, kiel ofte al teoriaj simboloj uzataj en la transformata lingvistiko por konstrui vortojn kaj frazojn respondas veraj morfemoj en Esperanto. Ekz. al la simbolo *wh* enkondukita de Katz kaj Postal por la analizo de la anglaj demandvortoj, respondas la *ki* kiel komencliteroj de la Esperantaj demandaj tabelvortoj.

Speciale interesa por esperantistoj estas la teorio de Saŭmjan. Precipe kiam lia teorio estas aplikata al la morfologio, li montras rigardon al la lingvo iom similan al tiu de Zamenhof, ĉar kiel Zamenhof

# Lerni fremdan lingvon

**Kelkaj  
rimarkoj  
kaj eble  
helpaj  
kritikoj**

Se homoj frekventas Esperanto-kurson ili faras tion por lerni Esperanton kaj ne por lerni la nederlandan lingvon. Tio sonos tiom memkompreneble ke oni eble povas ukuzi min pri idiota rimarko. Se vi samopinias kun mi, ke ilia celo estas lerni la fremdan lingvon, vi eble atingas la saman konkludon, nome, ke estas psikologia eraro doni al ili lernolibron, en kiu troviĝas pli da nederlanda teksto ol da Esperanto, aŭ eĉ se estas la kvantoj de ambaŭ lingvoj 50% de la teksto.

La kaŭzo estas, ke en lingvo-instruado, ankaŭ en la lernejoj oni ankoraŭ sentas sin komforta per la traduk-metodo el la nacia lingvo, ke oni devigas la lernantojn apliki la ĵus instruitajn regulojn de la gramatiko en la tradukado de naci-lingvaj frazoj, kiuj multfoje tute ne havas iun rilaton unu kun la alia kaj multfoje tute ne havas ian praktikan sencon. Oni kronas ankoraŭ tro ofte la gramatikon reĝino, oni forgesas, ke la gramatiko estas nur helpilo por lerni la lingvon, estas promen-bastono, kiun oni forĵetas kiel eble plej baldaŭ por promeni memstare, ke la gramatiko estas nur trafik-lumoj de la lingvo kaj ne la lingvo mem, kiel la notoj kaj la signoj por lerni muzikon ne estas la muziko mem.

La defendantoj de la traduk-metodo volonte atentigas pri la fakto, ke oni almenaŭ laborigas la lernantojn, ke oni streĉe cerbumigas ilin pri la teksto kaj oni devigas ilin elĉerpi la memoron por montri, ke ili vere posedas la fremdan lingvon kaj ke per tio oni kontrolas ilian scion.

La leganto eble miras, se mi samopinias kun tiu rezonado. Oni laborigas ilin, oni cerbumigas ilin pri la teksto, sed pri la naci-lingva teksto kaj tro multe oni cerbumigas ilin pri tiu teksto kaj ke la traduko kiel kontrolilo estas tute taŭga vi poste povos legi en ĉi artikolo.

Sed tiaj ekzercoj havas sencon nur post ofta vivado en la fremda lingvo, post serioza traktado de peco en la fremda lingvo en maniero, kian vi povas legi en la vosto de ĉi tiuj rimarkoj. La rezulto de tro frua tradukado el la nacia lingvo estas: la lernantoj cerbumas pli pri la naci-lingva teksto kaj la fremda-lingva rezulto havas multajn erarojn kaj donas al la lernantoj kriplan kaj nekompletan bildon de la fremda lingvo.

La nuna defend-argumento estas: Per eraroj oni lernas kaj krome la lernantoj ricevas la ekzercon korektita. Eĉ tiel oni povas atingi ian rezulton, se la lernantoj reskribus la korektitan ekzercon en tiel nomata neta kajero kaj relernus la ekzercon tiel, ke la sekvantan lecionon ili kapablos legi memstare la esperanto-tekston el la nacia lingvo sen helpo de la neta kajero. Sed mia argumento restas: Oni povus lerni pli kaj pli rapide per evitado de eraroj kaj mi kredas ke la last-menciita rimarko donas al la lernantoj pli da memfido. Per la traduk-metodo la lernantoj vivas tro multe en la nacia lingvo, oni cerbumigas ilin tro multe per reguloj de la gramatiko kaj ili tro malmulte vivas en la fremda lingvo. Se oni kritikis en jena maniero la lingvo-instruadon en HBS kaj gimnazio, oni ĝenerale respondas: Ni havas 4 lecionojn kaj la lastan lecionon ni uzas por legado en

la fremda lingvo. La unuaj tri estas lecionoj en gramatiko. Laŭ mi la malo okazu: Tri lecionojn oni vivu en la fremda lingvo kaj la kvaran oni traktu la gramatikon, derivitan el la legaĵoj.

Oni povas distingi el la lernado kaj regad-kapablo de lingvoj du stadiojn: 1) La pasiva regado 2) La aktiva regado. Multaj atingas nur la 1an stadion. Ĝi konsistas el: Legi la fremdan lingvon, aŭskulti ĝin kaj kelkfoje traduki ĝin en la nacian lingvon. La 3a sperto el ĉi tiu stadio estas rekomendinda kiel ekzerco, speciale se oni provas relegi la fremdan lingvon al la nacia lingvo. Oni vivas pli en senerara, kompleta fremda lingvo kaj oni povas kontroli sin mem. Eĉ studentoj neniam superas la unuan stadion kaj ili ne bezonas atingi pli, ĉar ili uzas la lingvojn en fremdlingvaj studlibroj, do nur legas ĝin. Neniam mi aŭdis, ke studento startis traduki el nacia lingvo. En la fin-ekzameno de HBS aŭ gimnazio oni postulas tradukon de malfacila peco el la fremda lingvo, kion ili ĝuste bezonas kiel studento. Oni ne cerbumigas ilin per gramatikaj reguloj. Parte tia ekzameno ankaŭ okazas en la ULO-lernejoj.

La 2a stadio, la aktiva regado konsistas el: Memstare esprimi siajn pensojn en la fremda lingvo, buŝe kaj skribe, kaj traduki la nacian lingvon en la fremdan ankaŭ buŝe kaj skribe. Ambaŭ taskojn oni laŭ malfacileco povus dividi en du gradoj, ĉar dum la skribaj taskoj oni havas pli da tempo je sia dispono, dum en la parolaj taskoj oni ne povas atendi kaj atendiĝi por elĉerpi la memoron, sed ili havas alian avantaĝon. En memstara sinesprimado en la fremda lingvo oni estas libera en la elektado de vortoj, kombinoj, parolturnoj kaj stilformoj, kiujn oni, kiel la angloj diras, havas en

## LA INTERNACIECO DE ESPERANTO

Okaze de la transdono de la Propono al UN pri la solvo de la lingva problemo pluraj starigis la demandon, ĉu la Internacia Lingvo Esperanto kontentigas la bezonojn el vidpunkto de internacieco. La iniciatinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el elementoj maksimume internaciaj. Tial li metis en ĝian vortaron radikojn jam internaciigintajn kaj signis la vojon por plua riĉigo de la lingvo per novaj internaciaj esprimoj.

Sed li ankaŭ perfekte komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj kaj ke, por atingi facilecon, estas necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian lingvo-materialon. Tial Esperanto havas fonetikan ortografion, kio konsiderinde faciligas la akiron de la lingvo por ĉiu. Tial ankaŭ en Esperanto ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo aglutinan karakteron kun la plej simpla gramatika strukturo. Per la sistemo de afiksoj Esperanto atingis vastajn eblecojn de derivado, kio siavice ebligas rapidan akiron de la lingvo kaj ĝian tujan praktikan uzon skribe, lege kaj parole.

sia komando. Oni havas la eblojn eviti malfacilojn, oni povas paroli tiel simple kiel oni ŝatas, sed oni devas tuj komandi la vortojn, kaj ili devas tuj obei por salti rapide en la vico-ordon.

La verkado de letero, kompreneble estas multe pli facila, ĉar tempo, soleco kaj vortaro povas helpi vin.

Tute alia kaj pli malfacila estas la situo en rekta traduko el la nacia lingvo, ĉar nun oni estas katenita kaj ligita al la naci-lingva teksto, oni devas serĉi por nacilingva formo la ekvivalenton en Esperanto kaj oni devas demandi al si: Kiu ideo kaj kiaj sentoj kaŝas sin malantaŭ la nacia masko kaj tio postulas konon pri multaj sinonimoj, precipe por la adjektivoj. Oni nun ne povas eviti, oni ne povas elturni sin, oni ne povas ĉirkaŭiri la malfacilojn kiel Per Gint ĉirkaŭ-iris la vivon. Parole tiu tasko estas unu el la plej nervo-streĉaj el ĉiaj laboroj.

Eble vi jam konstatis ke ĝuste la traduk-metodo postulas tro multe de komencantaj lernantoj kaj estas pedagogie ne saĝa. Oni rajtas postuli, ke mi donu skizon de pli bona maniero, iun modestan gvidilon, per kiu la lernantoj faras malpli da eraroj, lernas pli en la sama tempo, vivas pli en la fremda lingvo kaj havas la sperton, ke ili vere lernas fremdan lingvon kaj akiras pli da memfido. Leciono povus esti jena:

1 Legado de simpla peco. 2 Reskribo de la peco. 3 Trovado de gramatikaj formoj kaj malfaciloj kaj noti kaj klasifiki ilin. 4 Trovi kaj noti regulon. 5 Notado de nekonataj vortoj. 6 Lerni parkere la pecon aŭ parton de ĝi. 7 Diktadon de la peco aŭ de parto. 8 Serĉi kaj noti la kernvortojn. 9 Verki memstare pecon ĉirkaŭ la kernvortoj. 10 Memstara rerakonto ĉirkaŭ la kernvortoj. 11 Traduki la pecon en la nacian lingvon. 12 Retraduki la nacilingvan tekston en Esperanton.

Jen pli da vivado de la lernantoj en la fremda lingvo kaj granda evitado de eraroj kaj kreskigo de memfido. Mia lasta rimarko estu: Ne postuli tro precizan uzon de Esperanto, ĉar ni en nia nacia lingvo tute ne estas precizaj. S.A.

Esperanto estas internacia ankaŭ el vidpunkto de la homkolektivo, al kiu ĝi apartenas. La naciaj lingvoj, eĉ se ili estas uzataj en pli aŭ malpli alta grado por internacia komunikado, restas en ĉiu okazo naciaj kaj laŭ siaj historiaj tradicioj, kaj laŭ la interna strukturo kaj, ĉefe, laŭ la socia portanto. La naciaj lingvoj apartenas al la koncernaj nacioj. Male, la Internacia Lingvo estas proprajo de internacia kolektivo kaj ĉiu membro de tiu kolektivo sentas ĝin kiel sian. Tial, Esperanto estas la sola vere internacia lingvo ankaŭ el vidpunkto de sia socia portanto.

Fine, Esperanto estas internacia ankaŭ laŭ la celo, al kiu ĝi servas: funkcii kiel neŭtrala, supernacia instrumento de komunikado en mondaj kadroj.

Neniu nacia lingvo posedas tiujn tri esencajn elementojn de internacieco. Tial neniu nacia lingvo, eĉ ne la plej disvastiĝinta, povas esti nomata „internacia”. Nur lingvo, kiu estas vere internacia kaj laŭ sia strukturo kaj laŭ la socia portanto kaj el tiu de la celo, povas prave esti nomata internacia. (ricevita de UEA).

Je la 30a de aprilo '66 k-do Korff devis forlasi la sekretarian postenon pro tro da laboro en aliaj organizoj de nia Esp.-movado. Postsekvis lin k-do Punt.

En tiu tago okazis la jarkunveno de FEN, kies agadjaro iras egalpaŝe kun la kalendaro. En la daŭro de la kunveno la estraranoj ricevis superrigardon pri ĉio kion FEN planis, efektiviĝis kaj esperas efektiviĝi. Antaŭ ĉio montriĝis, ke la diversaj komisionoj ankoraŭ ne atingis multon.

*La komisiono de redaktoroj* kunvenis unu fojon, sed na faris akordon pri eldono de komuna studgazeto. La financa flanko estas tre grava. Pri la komuna propaganda gazeto estas direble nur, ke oni plu laboros por realigo. Promesita financa subteno (ekzemple flanke de Philips) ne okazos.

*La komisiono de libro-servantoj* proponis eldoni komunan katalogon, kiun kompilos s-ro Boersma kaj kiun poste preparolos la komisiono.

*Komisiono por informado:* Kelkaj ĵurnalistoj promesis kunlabori, sed estas ege malfacile kunveni ĝin. Tamen paŝo antaŭe estas farita sur la tereno de la kontakto kun la gazetaro. Okazis kunveno de la estraro, en kiu konata ĵurnalista faris enkondukon tiurilatan.

*La Kontakt-komisiono:* Tiu kunvenis kaj konsilis atendi la raporton el Seminario pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Ĵurnalaraj Rilatoj, kiu okazis en Jugoslavio.

*La Kernekspozicio:* Estiĝis kontakto kun metilerneja instruisto, kiu pretas konstrui ĝin laŭ la projekto de la konata „Konstru-Centro” en Rotterdam.

*La Kultura Komisiono:* ankoraŭ ne kunvenis.

*Esperanto en Komercio kaj Industrio:* Bazo de ties laboroj estos raporto de Hans Bakker patro. Tiu ĉi samideano jam individue kaj sukcese laboris ĉe la ANVV kaj nun prilaboras la terenon ĉe Ned. Fervoja Komp. S-ro Munniksma kompilos modernan terminaron komercan.

*La vortaro.* Jen zorgodona afero. Jam antaŭ longe la preparoj por ĉi tiu urĝe bezonata aĵo komenciĝis. Tamen ĝis nun la sopirata moderna vortaro ankoraŭ ne estas aĉetebla. La nombro da kompetentaj samideanoj ne estas granda kaj al tio kromas, ke tiuj kompetentuloj preskaŭ ĉiuj estas vaste super la pensiorajta aĝo. Sed malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj la klopodoj por eldonado estas daŭrigataj.

*La rebata servo:* D-do Makkink (Eekhoornlaan 10, Bennekom) plendas pro nesufiĉa interesiĝo ĉe la gesamideanoj mem. Li petis, ke la redaktoroj de la diversaj organizaj organoj informu pri la celo de la servo.

*La Malmgren-propono:* pri studado fare de Unesko de la lingva problemo. La prezidanto de FEN, mag. Winkel, kune kun d-ro v. Rijsinge vizitis ministron Diepenhorst por influi, pere de tiu, la nederlandan Unesko-komisionon, ke ĝi subtenu la proponon.

*Pri „Teleac”:* La kontaktoj kun tiu instanco ankoraŭ ne donis rezultaton. Ministro Vrolijk promesis al FEN aŭdiencon. La preleg-vojaĝo de la rusa aktoro Rytjkov fariĝis granda sukceso.

*„Bazaj faktoj pri la internacia lingvo Esperanto”.* Post la jarkunveno aperis tiu broŝuro en la nederlandlingva traduko de s-ro Wensing. La faktaro estas kompilita

de prof. Lapenna. „Stichting Esp. bij het Onderwijs” disdonos la broŝuron en la instruista mondo kaj la aliĝintaj Esp.-organizoj ĉiu sur sia propra tereno. FEN mem intencis disdoni ĝin al ĉiuj parlamentanoj, senatanoj, ŝtataj sekretarioj kaj membroj de la registaro. La eksplodinta kabinet-krizo igis la aferon stagni, sed post la provizora solvo la broŝuroj tamen estos sendataj.

Traduko en Esperanton de nomoj de viandaĵoj aperis en la gazeto „De Slager”, flanke de alilingvaj tradukoj. La tradukon prizorgis s-ro H. Bakker-patro. Ankaŭ la redaktoroj de „De Kruidenier” kaj „Distributie en Zelfbediening” intencas agi same pri 500 terminoj kaj fakesprimoj. Verŝajne la tuto poste aperos libreto-forme. Por atingi ĉi ĉion la prezidanto de FEN, mag. Winkel, faris multon.

Dum la lastepasintaj monatoj ekzistis vigla kontakto inter la aliĝintaj organizoj kaj la sekretariejo. Taskoj kiuj plu postulas la atenton estas: la gazetara servo, la diversaj komisionoj, la propagando kaj eventuale kurso pere de la radio (NRU jam promesis konsideri nian konceman peton), kaj la kontaktoj kun la komitatoj por kunlaboro loka en la lando. Ankaŭ necese estas informi la nederlandan esp.istaron pri la taskoj, devoj kaj ebloj de FEN. Iuj homoj ankoraŭ malprave opinias, ke FEN estas instanco, sub kies kuratoreco estas la aliĝintaj organizoj. FEN ne estas panaceo, sed ĝi povas esti kunliga faktoro en la tro malvasta medio de la nederlandaj esperantistoj.

Ph. Punt  
*La raporto, kvankam aperante en la februara numero de LE, apartenas al la ĵarraportoj de nia Asocio.*

## El la sekcioj ★

En la lastpasinta monato ni perdis tri membrojn.

La 20an de novembro mortis en Maassluis k-do J. Visser.

Nia Antverpena sekcio sciigis la morton, la 13an de decembro, de k-do H. Tiepermann, 53 jara.

Kvankam lia esperantisteco ne datumis de tiel longa tempo kaj ke nur de post kelkaj jaroj li estis membro de nia Asocio, li ĉiam aktive partoprenis la grupan vivon. Pro lia forpaso, la Antverpena esperantista laboristaro perdas ŝatatan samcelanon.

Trafis nin la informo pri la morto de k-do F. Langeberg, 65 jara,

je la 27a de decembro. Ĉiuj, kiuj konis k-don Fred Langeberg el Wormer scias, ke ni perdis fidelan, fervoran membron. Lian esperantistan vivon ni memoros en sekvonta numero de LE.

*Al la parencoj de la mortintoj ni sendas niajn korajn kondolencojn.*

### WORMERVEER

En nia lasta kunveno ni decidis likvidi nian sekcion, ĉar niaj funkciuloj pro maljunaĝo kaj sanstato ne plu povas plenumi sian taskon.

Sed ni restas FLE-anoj.

Kelkaj el ni preferis esti ĝenerala membro, kelkaj volas transiri al sekcio Wormer (kiu sekcio jam havas membrojn en Wormerveer).

Tiel sekcio „Frateco” (Wormer) estu sekcio Wormer-Wormerveer.

Por la lasta fojo: G. Woud, sekretario.

AMSTERDAM  
Curiestraat 22hs

Ni tute ne forgesis ankoraŭ, kiam k-do W. Dekker je la 1a de nov. '64 rakontis al ni pri siaj travivaĵoj „Dum 6 semajnoj en Kanado”.

Multajn jarojn ni jam konas lin kiel aktivan kunlaboranton por nia komuna celo. Maljunaĝa li estas, sed lia entuziasma fervoro, liaj multaj iniciatoj por diversaj planoj atestas pri animstato, per kiu li ĉiam restas juna. Tamen li estas ne la optimisto, kiu vidas nur agrablajn. Ankaŭ malbonajn flankojn de iu afero li povas vidi. Tial en sia rakonto, li avertos nin pri iu grava danĝero: REGRESO EVITENDA! La potenco de la atomo...! Esperu ni, ke lia averto restu ne senefika.

Iel ni povas influi tion: per nia ĉeesto! Ni atendas vin je la 10.00a horo matene en la konstruaĵo „De Leeuw”, Valkenburgerstraat 149, dimanĉe, la 29an de januaro 1967.

En la sama konata ejo la 18an de decembro ni aŭdis k-don Foeke de Vries pri la internaciaj kontaktoj de la sindikatoj. Ni ankoraŭfoje dankas lin pro la lerta kaj detala maniero laŭ kiu li faris tion!

Lia priskribo estis tute klara!  
Nome de la tuta estraro deziras al vi *feliĉan novan jaron*

via sekr. D. Veen.

ROTTERDAM  
2e Pijnackerstraat 12a

Post tre agrabla mateno pere de la belaj diapozitivoj pri la Swanwicka SAT-kongreso, prezentita de k-do v. d. Horst el Hago, ni nun alvokas vin por nia venonta SAT-kunveno.

Je la 29a de januaro parolas por ni k-do W. Geurtz kaj la temo estos: „De lerneja knabo al mondĉampiono”.

Komencu la jaron 1967 bone, kaj vizitu regule niajn kunvenojn en Strijensestraat 65, je la 10.30a horo.

Nia estraro deziras al ĉiuj anoj sanan kaj prosperan jaron 1967!

M. Bout-v. Veen, sekretariino.

## SAT-JUNULFAKO

*Estu ĝustatempe*

Unue mi deziras al vi ĉiuj feliĉan kaj prosperan Novjaron.

Kiel mi jam anoncis en la decembra LE, je la 1a de januaro la nova abonjaro komenciĝis. Tio do signifas, ke vi ree devas pagi vian kotizon por La Juna Penso.

Jam multaj faris tion, sed de kelkaj mi ankoraŭ ne ricevis monon. Tial mi atentigas ilin, tuj pleniĝi sian ĝirbileton, por ke ili ne estu tro malfrue.

Proksimume je la 15a de februaro 1967 mi jam devas sendi la membroliston al la estraro en Bordojo. Mi do petas vin nuligi vian ŝuldon antaŭ tiu dato, por ke vi ne malhavu nian tre interesan bul-tonon.

Vi povas pagi pere de mia poŝtkonto 1256397. La kotizo sumiĝas je f 3,— por anoj kaj f 4,— por subtenantoj.

Esperante, ke mi baldaŭ ricevas vian ĝirpagon, mi tutkore salutas vin,

Corrie Kooy  
Franselaan 270b, Rotterdam-7

